tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

Oktobro 2024 / n-ro **144**

- La 12a kongreso de kroataj esperantistoj okazis en Prvić Luka
- Registro de kroataj esperantistoj startis
- En la afrika Aruŝa estis lanĉita la svahila zagreba lernolibro
- Plia ZEO en Kroatio – memortabulo al Antonija Jozičić en Hrv. Kostajnica

ISN 2991-194X

Karaj legantoj

Forrapidis la varmega somero. Multaj el ni malfacile eltenis tian varmegon. Kiam oni antaŭ jaroj anoncis ke estonte la someraj varmoj estos varmegoj, ni ne imagis ke jam nia generacio estos trafita de tiu varmo de la estonteco.

En junio okazis lanĉo de la nova kroata ZEO (Zamenhof-rilata objekto): en **Hrvatska Kostajnica** estis starigita omaĝtabulo al la instruistino **Antonija Jozičić** al kiu ni dankas esperantigon de la romano "Konfeso" en 1913 per kiu estis ĉinigita kaj publikigita la unua verko el la kroata literaturo. La publikigo okazis en Ŝanĥajo en1931.

En junio okazis la programriĉa dekdua kongreso de kroataj esperantistoj sur la insulo **Prvić**. Ĝi kombinis la kongreson kun la feriado ĉe la maro kaj tion la partoprenintoj tre ŝatis. Pro tio ĝi fariĝis aparte internacia. Prizorgita ĝi estis de Dokumenta Esperanto-Centro. Tie estis ankaŭ lanĉita *Registro de kroataj esperantistoj*. Ĉiuj kroataj esperantistoj estas invitataj enskribiĝi por ke ni ricevu detalojn pri tio kiom multnombraj ni estas. La registron lanĉis kaj pri ĝi zorgas **Josip Pleadin** kaj lia **Dokumenta Esperanto-Centro**. Sur la titolpaĝa foto de **Ivan Špoljarec** ni prezentas la kolektivan kongresan foton. Al ĝi rilatas la artikolo de **Eric Nsabijumva.** Ni prezentas la resumon de la Kongresa prelego de **Robert Milijaš**.

En julio **Ankica Jagnjić** ekveturis al **Aruŝa** en **Tanzanio** al la unu Universala Kongreso de Esperanto en **Afriko**. Tie estis interalie lanĉita la nova lernolibro laŭ la Zagreba Metodo – en la svahila. Ĝin al la svahila lingvo adaptis burundano **Eric Nsabiyumva**. Finance apogis la eldonon interalie Esperanto-Societo **Rijeka**.

La 26an de julio estis la Tago de Esperanto, la datreveno kiam la unua lernolibro de Esperanto de Doktoro Esperanto – **Lazaro Ludoviko Zamenhof** elvenis el la presejo en **Varsovio**. Universala Esperanto-Asocio ŝatus ke UNESCO akceptu tiun tagon kiel la tagon de Esperanto. Sed estas longa vojo ke tio okazu. Ĉiukaze tio estas grava dato en la historio de Esperanto, 136 plenaj jaroj da ekzisto!

En aŭgusto **Ankica Jagnjić** kontribuis al la Esperanta programo de la **Kastelo Grezijono** en **Francio**.

De la 17a ĝis la 18a de aŭgusto 2024 okazis en **Beograd** kaj **Zemun** en **Serbio** Internacia kongreso de blindaj esperantistoj, al kiu ligiĝis ankaŭ la seminario, metante en la fokuson la kunlaboron de balkanaj landoj. Ĉefprelegis profesoro **Duncan Charters**. El **Kroatio** partoprenis **Dragan Štoković**, **Višnja Branković** kaj **Neven Kovačić**.

Plia libro de **Tibor Sekelj** aperis en **Japanio**. Post kiam lia *Kumeuaua, la filo de la ĝangalo* estis eldonita en 300.000 ekzempleroj jen aperis la dua eldono kun pliaj 3000 ekzempleroj.

Ivan Špoljarec renkontiĝis en **Split** kaj **Klis** kun la usona esperantisto **Neal**, dum lia mallonga halto tie, inter la krozado kaj restado en **Greklando**.

La 11an de septembro 2024 ni kontribuis al flegado de nia nemateria heredaĵo Esperanto: rekomenciĝis nia ĉi-jara esperanta agado per promenado al la por esperantistoj historie grava loko al la statuo "La Futuro" sur la zagreba **Kennedy**-placo kiun Kroata Esperanto-Ligo instalis tie en 2001. Poste la partoprenintoj aŭskultis la prelegon de **Ankica Jagnjić** pri la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en **Afriko** en **Aruŝa** en **Tanzanio**. La ĉeestintoj povis vidi la novan zagreban svahilan lernilon.

Tiu programo estas nia parto de flegado de la protektita nemateria heredaĵo en **Kroatio** pri kiu Ministerio pri kulturo ĵus eldonis specialan broŝuron.

Ni atendas viziton el **Kolombio**! Vizitos nin la pranepojn de nia iama membro **Stanislav Tomić.** La vizitontoj estos la patrino **Matilda Saldarriaga** ŝiaj gefiloj **Veronica Alzate** kaj **Esteban Alzate. Stanislav Tomić** aŭtoris la esperantan lernilon eldonitan en Zagrebo de **Librejo Zaklinčić** kaj aŭtoris *Du sudslavajn popolfabelojn*. (Lia libro *La vojo al vero* eldonita en Esperanto en 1910 en **Parizo**, ne plu troveblas en nia biblioteko.) Nia hungara amiko **Sabolcs István** trovis la lernilon *Esperanto u 33 lekcije* en antikvaĵejo en **Rijeka.** Ĝi estis publikigita de Naklada društva hrvatskih esperantista en 1919.

Speciala vizitanto venos en oktobro el **Bharato.** Li estas **Sourabh Dattagupta Samat** la eldonisto kiu en la bengala lingvo eldonis **Joža Horvat** kaj la verkon *Wakajtapu* samkiel la slovenan verkiston **Tone Partljič** kaj lian verkon *Mi volis tuŝi la sunon*. Ambaŭ libroj estis eldonitaj per la Esperanta traduko de **Probal Dasgupta**.

La 57a Pupteatra Internacia Festivalo, kiun lanĉis Studenta Esperanto-Klubo okazis en Zagrebo de la 13a ĝis la 19a de septembro 2024. En ĝi daŭre estas atribuata *Premio Tibor Sekelj* por la plej homama mesaĝo de la pupteatra verko.

En **Pula** oni daŭre atribuas premion nomita laŭ la kroata esperantisto **Ivo Borovečki**. La premion ricevas la leganto kiu plej multe legas. Ni prezentas por via legado du kroatajn poemojn.

Bonan legadon kaj aŭskultadon!

S. Štimec

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj.
Jaro XLV (45), numero 144 (2/2024) ISN 2991-194X. Sona numero 62/2024.
Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004 kaj en 2022, 2023 kaj 2024 ĉe la Biblioteko por blindaj kaj malbonvidantaj personoj en Zagreb. Voĉlegas Spomenka Štimec.
La reta versio de Tempo ĉe: www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

Redakcio / Uredništvo; **Eldonisto / Nakladnik:** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; kel@esperanto.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Nikola Cetina, Tomislav Divjak, Zlatko Hinšt, Filip Ivančić, Gustav Krklec, Damir Mikuličić, Robert Milijaš, Eric Nsambiyumva, Josip Pleadin, Erĵebet Sekelj, Ivanka Seleš, Norma Šerment, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar, Tin Ujević, Boĵidar Vančik

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Sur la titolpaĝo: Partoprenantoj de la 12a kongreso de kroataj esperantistoj, Prvić Luka. Fotis: Ivan Špoljarec

La 12-a kongreso de kroataj esperantistoj okazis en Prvić Luka

La unua el la kvin kongresoj de kroataj esperantistoj, por organizado de kiuj Dokumenta Esperanto-Centro el **Đurđevac** en 2023 ricevis koncesion de Kroata Esperanto-Ligo, okazis en **Prvić Luka** sur la insulo **Prvić** apud **Šibenik** inter la 21-a kaj 28-a de junio 2024. Laŭ ĉiuj karakterizaĵoj, ĉi tiu aranĝo estis malsama ol la antaŭaj kongresoj. La unuan fojon ĝi okazis en Dalmatio. Anstataŭ la kutimajn tri, ĝi daŭris sep tagojn kaj havis pli leĝeran karakteron.

La kongreso okazis en la hostelo de la Ripozejo **Požega** kiu, kompare kun la antaŭaj aranĝoj, estis iom pli modesta rilate la ofertitajn servojn, sed ĝi kontentigis plejparton de niaj bezonoj. Pro tio oni jam pridiskutas la eblecon organizi Esperanto-aranĝojn samloke ankaŭ dum la sekvaj jaroj.

Plejparto el la 85 aliĝintoj atingis la insulon per organizita busa kaj ŝipa transporto, kio por granda parto da ili ja estis unu el la ĉefaj instigoj por veni. Per publika transporto alveno sur la insulon estas malfacila kaj longdaŭra, kaj pro tio plejparto da kongresanoj decidis veni organizite. Kvankam la kongresanaro je unu triono estis malpli nombra ol kutime, konsiderante ĉiujn malfaciligajn cirkonstancojn, la organizantoj de la kongreso ne povas esti malkontentaj pri la kongresaj rezultoj. Aparte ĝojigas pli multnombra alveno de eksterlandanoj, el kiuj plej nombraj estis hungaroj (14). Tian nombron oni atribuas al la kunlaboro kun Hungaria Esperanto-Asocio surbaze de antaŭ longa tempo subskribita Interkonsento pri kunlaboro kaj al reklamado de la kongreso dum la festado de Zamenhofa tago pasintan decembron en Budapeŝto. El aliaj landoj partprenis **Aŭstrio** (1), **Burundio** (1), **Pollando** (1), **Slovenio** (1), **Kanado** (1), **Litovio** (1), **Italio** (1) kaj **Britio** (2).

En la oficiala kongresa programo Kroata Esperanto-Ligo okazigis sian jarkunvenon la 24-an de junio, kaj dum la kongreso estis organizita ankaŭ intensa Esperanto-kurso, ĉefe por la grupo da lernantoj el la 16-a (lingva) gimnazio el **Zagrebo**.

Dimanĉe, la 23-an de junio, sur la malferma teraso de la Ripozejo okazis bone vizitita koncerto de Esperanta muziko de **Neven Mrzlečki**, kaj tagon poste pri la temo „Kiel funkcias senpilotaj aviadiloj” prelegis **Robert Milijaš**.

En la dua duono de la kongresa programo estis prezentitaj du novaj literaturaj eldonaĵoj de DEC: la romano „Alina” de la bulgara verkisto **Julian Modest** kaj proza-poezia kolekto „Nokta vojaĝo” de la ukraina aŭtorino **Tatjana Auderskaja** el **Odeso**. La librojn prezentis **Zdravko** Seleš kaj **Josip Pleadin** kun partopreno de la verkisto **Julian Modest**.

Per informa projekcio estis prezentita biografio de esperantistino **Antonija Jozičić** el **Hrvatska Kostajnica** kaj la ĵus eldonita monografio pri tiu temo. Estis anoncitaj kongresoj por sekvaj jaroj kaj prezentita Erasmus+ projekto „Eŭropaj horizontoj pro kreski”. Tamen, eble la plej grava atingaĵo de la kongreso estas la lanĉo de la longe atendita Registro de esperantistoj en Kroatio.

Dum la kongreso okazis eĉ kvar ekskursoj, tri surmare kaj unu surtere, ĉiu por po trideko da kongresanoj. Sabate, la 22-an de junio, la kongresanoj vizitis la **Nacian Parkon Krka**, unu tagon poste (la 23-an de junio) la **Nacian parkon Kornati**, kaj la 25-an de junio (marde) la insulojn de la ŝibenika arkipelago (**Kaprije**, **Žirje** kaj **Zlarin**). Aŭtobusa ekskurso al **Primošten** estis realigita la 28-an de junio, kaj ĉiujn ekskursojn gvidis profesia Esperanto-ĉiĉerono **Neven Kovačić**. El la ceteraj programeroj menciindas vizito al la Memorcentro de **Faust Vrančić**, kiu okazis la 26-an de junio.

Estis eldonita kongresa libro, kaj la kongresanoj havis la okazon jam aliĝi al la 13-a kongreso, okazonta inter la 16-a kaj 18-a de majo 2025 en Slavonski Brod.

La prikongresajn fotojn vi povas vidi je:
https://novo.dec-kroatio.hr/hr/galerija/

La kongresa arkivo troviĝas je:
https://novo.dec-kroatio.hr/hr/kongres-hrvatskih-esperantista-2024/

Josip Pleadin

Fotoj: Ivan Špoljarec

Afrikano en la Kongreso de kroataj esperantistoj

Karaj gelegantoj, kiam mi verkas tiun artikolon mi estas kun la kapo kaj la pensimaniero de afrikano kiu neniam metis siajn piedojn sur iu insulo, kaj tiu artikolo estas por mi la dankesprimo al ĉiuj geesperantistoj kiuj helpis min kaj ĉiam zorgis pri, mi neniam estis sola kvakam mi estis tre tre rimarkinda... Mi plejparte dankas samideanon Josip Pleadin kiu senlace invitas min al diversaj esperantaj aranĝoj kaj zorgas pri ĉio por ke mi sentu min sekura.

En **Kroatio** dum unu jaro kaj ses monatoj, mi finfine eksperimentis ion tre ekscitantan, mirindan kaj neforgeseblan; temas pri la plenemocia aventuro sur la insulo **Prvić Luka** tra kiu mi havis mirigan septagan periodon de esploroj, ĉeestadoj al riĉigaj programoj de la kongreso, konatiĝo kun novaj esperantistoj el diversaj landoj kaj kortuŝan momenton de banado en la maro.

Ekiro el **Zagrebo** ŝajnis al mi kiel adiaŭa momento, mi eksentis la gravecon de la aventuro, ĉiu kiu sia valizo zorgeme intencis enri la grandan buson kaj la ŝoforo indikis la lokon en la suba parto de la buso kie ni devis meti niajn pakaĵojn. Jen mi, kun malgranda valizo alvenis al la indikita renkontiĝloko kaj trovis ĉiujn gesamideanojn; ĉirkaŭ la buso babiladis pri ĉio kaj nenio ridegante, mi sincere devas diri ke mi sentis min timigita de tiu etoso de esperantistoj. Tiam la fruktdona vojaĝo per buso komenciĝis ĝis la haveno de **Ŝibenik**.

La neforgesebla veturo montriĝis kiel interesa leciono pri kroata historio kaj geografio kies profosoro, sinjoro Neven, per aŭdebla kaj bela voĉo dulingve klarigis, per komprenebla esperanto kaj kroata, la cirkonstacojn, trajtojn kaj proprecojn de ĉiu kroata regiono per kiu ni trapasis de **Zagrebo** al **Ŝibenik**. Ni multon lernis kaj rajtis demandis kiel en lernejo.

Jen ni plue en la haveno de **Ŝibenik** por enŝipiĝi al nian cellokon, **Prvić Luka**. Mia vera aventuro komenciĝis, tio estis mia unua ŝipa veturado, la mallonga daŭro de flosado sur la maro igis min havi diversajn kaj konfuzigajn sentojn: ekcitado, timo, ĝojo, scivolemo.... tia estis mia mensa stato.

Alvenite al la ripozejo de **Prvić Luka**, oni prezentis min al ĉambranoj **Georgi** el **Bulgarujo** kaj **Luka** el **Italujo** kun kiuj mi esploris la tri vilaĝojn de la insulo kaj babilis pri diversaj aferoj. La insulo estis tiom paciga kaj trankvila loko ke mi eĉ sentis min ekstere de mi mem, kvazaŭ mia animo vagadis en la transmondon, kie ĉio kaj ĉiu aspektis nature. Sen veturiloj kaj sen grandaj fabrikoj, en tiu verda loko mi malkovris grandskale ke ĉiu povas harmoniigi sian internan estaĵon kun sia reala vivo.

Georgi, **Luka** kaj mi piediris en diversajn direktojn por trovi vendejon, restoracion kaj aliajn specialajn lokojn sur la malgranda insulo, la unuan vesperon ni sukcesis trovi la vendejon kaj ĉiu aĉetis kelkajn aferojn. La vivo estis tiom bela kaj interesa ke ni sentis nin diskonektitaj de alia parto de la mondo, ni kartludis, kantis kaj dancis kiel geadoleskantoj sen aliaj zorgoj.....vera tera paradizo.

Fotis: Ivan Špoljarec.

Plie, mi riĉigis mian intelekton per altevaloraj programoj de la kongreso. Ĉiu sin kulturis per prelegoj pri droneoj (senpilotaj aviadiloj), libro-ekspozicioj de diversaj famaj aŭtoroj, la vesperaj interbabiladoj kun esperantaj kantoj. Mi ankaŭ enskribiĝis en la kroatan registron de esperantistoj, ja mi vivas en **Kroatio** pli ol unu jaron kaj mia kroata iom post iom progresas. Estus bele se ĉiu kroata esperantisto enskribiĝus. Ĉu vi estas en la registro?

Ni minimume tri fojojn tage baniĝis kaj pro tio mi havis bonvoleman profesorinon pri naĝado en la maro, mi ne povis naĝi en profunda akvo ĉar mi timis; ĉar sen sperto mi ne fidis je la maro kaj ĉiam timis ke mi dronos. Tiam, jen alvenis sinjorino **Zdravka** kaj sinproponis bonkore min trejnadi kiel mi povas ripoziĝi sur la maro en profunda akvo, flosante sur la maro dorskuŝe. La sekvantan tagon mi sukcesis kaj tio igis min pligrandigi la amon al la maro ĝis kiam, iun vesperon **Ankica** elstarigis la ideon ke ni baniĝu dum la noktomezo.....Heeeh, baniĝi tiom nokte..... la ideo tuŝis min kaj min timigis.

Ekcitita kaj kun granda timo, mi sukcesis sekvi ilin kaj normale baniĝis.....oh kia bela vivo post kiam mi malkovris freŝecon kaj trakvilecon de la maron noktmeze, jen afrikano ekfidas je la maro!

Por mi, esperanta kongreso fariĝis granda momento de konatiĝo kun mi mem kaj kompreno de la mondo. La verdaĵo de la insulo kaj interago de samkongresanoj kreis daŭrajn memorojn en mia kapo.

Fine, kiel dirite, belaj aventoroj neniam longe daŭras, jen ni denove laŭvice staras, atendante eniri la ŝipon por reveni en la realan vivon kaj alfronti ĝian ĉiutagan kaj amarigan sperton.

Eric Nsabiyumva

Noto de la redaktorino:

La amariga sperto vere trafis Eric. Revene al sia zagreba restadejo, de kiu li ricevis skriban forpermeson de la estro por la partopreno en la Kongreso, li trovis en sia ĉambro sian ŝrankon – malplenan. Liaj aĵoj nenie troveblis. Iu eble imagis ke li fuĝis... Verŝajne mankis kontakto inter la estro kiu donis la forpermeson al Eric kaj la subuloj. Ĉiuj liaj aĵoj estis for.

Tiel venis aĉa puno pro lia ĝuado kaj flosado surdorsa en la Adriatika maro kaj la mallonga elŝaltiĝo el la realo.

Fotoj de Ivan Špoljarec

Pri senpilotaj aviadiloj

En la Kongresa programo sur la insulo **Prvić Luka** troviĝis interalie la prelego de **Robert Milijaš** pri la senpilotaj aviadiloj. En ĝi la preleganto prezentis diversajn tipojn de senpilotaj aviadiloj kaj la konsistigajn partojn necesaj por ilia konstrado. Li ankaŭ klarigis kiamaniere senpilotaj aviadiloj vidas la mondon ĉirkaŭ si kaj ankaŭ kiel la senpilota aviadilo cerbumas. La prelego elmontris kelkajn interesajn aplikaĵojn de senpilotaj aviadiloj.

Robert Milijaš (1995**)** laboras kiel juna esploristo kaj doktoriĝonto en la Laboratorio por robotiko kaj inteligentaj kontrolsistemoj (LARICS) en la Universitato de Zagrebo, en la Fakultato por elektroniko kaj komputado. Li tie eklaboris post la diplomiĝo en 2019.

Liaj esplorinteresoj estas robotika mapado (SLAM), senpilotaj aviadiloj kaj la robotika percepto. Li partoprenas en diversaj esplor-projektoj inkluzive AEROSTREAM.

Li lernis Esperanton inspirita de sia amikino esperantistino Mihaela kaj transprenis la gvidadon de Studenta Esperanto-Klubo.

En la mandato 2023-2026 li estas estrarano de Kroata Esperanto-Ligo.

R. Milijaš

Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Societo Rijeka kunfinancis la svahilan eldonon de la Esperanto-lernilo



Kiam en 1961 **Tibor Sekelj** organizis *Karavanon de amikeco tra **Afriko**,* revene li proponis ke iu venonta Universala Kongreso de Esperanto okazu en **Afriko**. Ni povas legi pri lia entuzasmo por **Afriko** en la libro "Ĝambo *Rafiki*"(la esperantlingva libro kun la titolo en la svahila lingvo "Saluton, amiko"). Unu el la homoj kiujn li renkontis estis **Pascal Sao**, la posta fondinto de Tanganjika Esperanto-Asocio.

La nuna **Tanzanio** kreiĝis per la kunligo de **Tanganjiko** kaj **Zanzibaro**. Ĝi havas du oficialajn lingvojn la svahilan kaj la anglan sed ankaŭ la araba estas parolata ĉefe ĉe la insulo **Zanzibaro**.

Jen 60 jaroj poste maturis la ideo de **Tibor Sekelj** dank al persista laboro de **Francesco Maurelli,** kiu post kelkaj propraj profesiaj vizitoj al Tanzanio proponis ke la bele ekipita urbo **Aruŝa**, kiu havas multajn internaciajn diplomatiajn spertojn (kaj kiu estas interalie simbolo de la subskribitaj packontraktoj post la civila milito en **Burundo**), gastigu la kongreson. Tiel Universala Esperanto-Asocio eniris grandan aventuron okazigi sian 109an Universalan kongreson en **Aruŝa**. La evento okazis de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2024.

Per la elstara laboro de Francesco kaj aliaj multaj junaj afrikaj esperantistoj ricevis subvencion por ĉeesti en Aruŝa. *Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo* estis la titolo de la Kongresa temo. Tio ekstreme junigis la kongreson.

De Kroata Esperanto-Ligo venis eta kontribuo: la nova lernolibro pri Esperanto laŭ la Zagreba Metodo en la svahila adapto de la burundano **Eric Nsabiyumva**. **Ankica Jagnjić**, estrarano de KEL persone ĉeestis la kongreson. Per la helpo de Esperanto-Societo **Rijeka** kaj per privata anonima sponsoro, estis presitaj 300 ekzempleroj de la lernilo. Kroata Esperanto-Ligo kiel eldonisto transdonis devigajn ekzemplerojn al la Nacia kaj Universitata Biblioteko en **Zagrebo** kaj deponis tie por la estonta uzo.

La kongresa kuriero *Voĉo de Kilimanĝaro* raportis.

S. Štimec

Kroata Esperanto-Ligo publikigis en Tanzanio novan lernolibron de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo en la svahila lingvo. La lernilon adaptis al la svahila burundano Eric Nsabiyumva. La svahila estas parolata de ĉ. 100 milionoj da homoj en orienta Afriko en 12 landoj. La libro estis presita en Aruŝa, la kongresurbo de la 109a Universala Kongreso de Esperanto, kiu la unuan fojon okazas en Afriko.

Tridek unuaj ekzempleroj estis senpage distribuitaj dum la Movada Foiro en Aruŝa. Postkongrese ĝi estos havebla ĉe Kroata Esperanto-Ligo kontraŭ 10 eŭroj, plus sendokostoj.

Tio estas la 22a lingva presita lernilo lanĉita de Zlatko Tišljar kaj liaj kunlaborantoj en 1978. En multaj pliaj lingvoj ĝi konsulteblas ĉe www.Esperant12.net

S. Štimec

REGISTRO DE ESPERANTISTOJ EN KROATIO

„Kiom da esperantistoj estas en Kroatio?". Tiun demandon ni ofte aŭdas, sed respondi povas nek Kroata Esperanto-Ligo (KEL), nek iu ajn, eĉ plej bone informita esperantisto. En tiaj situacioj ni ofte elturniĝas per kontraŭdemandoj (ekz.: kiom da ŝakludantoj estas en Kroatio?) aŭ parolas troige kaj neprezice pri nombro da kursanoj, membroj de niaj societoj aŭ kvanto da venditaj lernolibroj. Por la demandinto, tia respondo, kompreneble, ne estas konvinka!

Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) posedas liston de proksimume 1100 nomoj de esperantistoj en Kroatio, sed ĝi estas neaktuala kaj nekompleta. Pro tio DEC proponis al KEL finfine solvi la problemon per formado de unueca Registro, kiu por la unua fojo donus almenaŭ uzeblajn statistikajn informojn. KEL akceptis la proponon en 2023, kaj la Registro estas lanĉita ĉi-junie dum la 12-a kongreso de kroataj esperantistoj en Prvić Luka.

Ŝajnas, ke la graveco de tiu Registro ne estas tuj komprenebla, ĉar multaj, eĉ tre aktivaj esperantistoj, kvankam plurmaniere informitaj, ĝis nun ne registriĝis, sed pro diversaj kaŭzoj prokrastis tion aŭ plene ignoris! Kvankam la registriĝo estas libervola, la Registro estos tiom kompleta, kiom ni komprenos ĝian gravecon kaj la fakton, ke registri neniun povas KEL aŭ iu societo, sed ĉiu el ni devas **registriĝi individue**.

Sekve, la rezulto dependas **nur de ĉiu el ni mem!** Ne gravas ĉu vi estas membro de KEL aŭ de iu societo, ne gravas eĉ ĉu vi estas aktiva movadano aŭ ĝis kiu grado vi scias kaj uzas la lingvon. **Gravas nur ke vi mem konsideras vin esperantisto!**

Prioritata tasko de ĉiu el ni estu, ke pri la Registro ni informu aliajn kroatajn esperantistojn kaj instigu ilin registriĝi. Ni registriĝu amase jam en la komenco! Per tio ni donos bonan ekzemplon ankaŭ al aliuloj!

Konsideru, ke post multaj klopodoj Esperanto en Kroatio estas proklamita nemateria kultura havaĵo! Pri tio neniu alia lando krom Pollando povas fieri! Pro la akirita statuso ĉiu el ni havas almenaŭ moralan respondecon deklari sian esperantistecon! Tio, kio de ni mem postulas **nur kvin minutojn por plenigi la formularon**, estos grava pruvo al la ŝtataj instancoj, ke la honorigo de Esperanto havis la sencon! Kvin minutoj da via tempo estos milmejla paŝo por la estonteco de Esperanto en nia lando!

Se vi sentas vin respondeca pri Esperanto, se vi volas ke ĝi pluvivu kaj retenu la saman statuson en Kroatio − ne prokrastu vin registriĝon!

Detalojn pri la Registro vi povas legi ĉe:

https://novo.dec-kroatio.hr/hr/registar-esperantista-u-hrvatskoj/

Tie troviĝas ankaŭ la reta kaj printebla formularoj por la registriĝo, sed, se vi preferas, vi povas peti ankaŭ paperan formularon ĉe DEC (**Bana Jelačića 138A, 48350 Đurđevac; dec.kroatio@gmail.com; telefono 098 248 574**), kaj vi tuj ricevos ĝin!

Fieru, ke vi havas la eblecon partopreni en la unua esperantista „popolnombrado" en Kroatio!

Josip Pleadin

Memortabulo al esperantistino Antonija Jozičić en Hrvatska Kostajnica

La 16an de junio 2024 kroataj esperantistoj veturis al **Hrvatska Kostajnica** por ĉeesti la omaĝon al la instruistino **Antonija Jozičić**, kiu tie en la jaro 1913 eldonis la esperantlingvan libron "Konfeso". El tiu libro estis tradukita la unua traduko de la kroata literaturo al la ĉina. La traduko aperis en Ŝanhajo en la jaro 1931, kreita de ĉina verkisto kaj tradukisto **Wang Luyan**. Dokumenta Esperanto-Centro havigis en Ĉinio ekzempleron de la presita libro.

Nun la instruistino ricevis sian memortabulon - fiksitan sur la fasadon de la lernejo kie ŝi instruis La tabulon prizorgis **Josip Pleadin** kun Dokumenta Esperanto-Centro, per la helpo de Komunumo **Hrvatska Kostajnica**. La tabulon enkondukis la urbesto de **Hrvatska** Kostajnica **Dalibor Bišćan** en ĉeesto de pluraj gvidantoj de urbaj lernejaj kaj kulturaj instancoj. La programo pri la esperantistino **Antonija Jozičić** fariĝis parto de la katolika festo honore al Sankta **Antonio**, kio al la pia instruistino **Antonija** verŝajne plaĉus. Post la memormeso al Antonija, la loka pastro benis la surmuran tabulon sur la lerneja fasado. Tiel **Kroatio** ricevis en **Hrvatska Kostajnica** ankoraŭ unu plian ZEOn-Zamenhofrilatan Esperanto-Monumenton.

En la hotelo Central estis prezentita detala monografio pri la instruistino Antonija Jozičić por kiu la aŭtoro **Josip Pleadin** dum tri jaroj kolektis materialojn. La libron prezentis **Zdravko Seleš** dum **Josip** Pleadin konatigis al ni la vivon de la ĝisosta movadanino, kiu partoprenis Universalan Kongreson en **Antwerpen** (1911), **Krakovo** (1912) kaj, kvankam la Universala Kongreso de Esperanto en la milita **Parizo** ne okazis en 1914, per ŝi venis al **Kroatio** la fama pariza Kongresa afiŝo, kiu nun ornamas la ejon de Kroata Esperanto-Ligo.

La libro estis prezentita en secesistila salono de la Hotelo Central, kie muzikis la ensemblo HORKUD Golub el Bjelovar, uzinte ankaŭ la muziknotojn el la postlasaĵo de la esperantistino **Antonija**.

Aparta aŭtobuso venigis la esperantistajn gastojn al la evento en **Hrvatska Kostajnica**. La esperantistoj vizitis la ejon en la malnova lernejo kie estis muntita ŝia ĉambro, plena je la ĉarmo de ŝia malnova meblaro, vazaro kaj ŝiaj manlaboraĵoj. Multaj artefaktoj konserviĝis dank' al afabla heredintino **Milkica Lukić,** kiu ĉefe zorgas pri konservado de la memoro pri **Antonija**.

Esperantistoj vizitis la lokan tombejon kaj memore metis florojn al ŝia tombo.

S. Štimec

Fotis Nikola Cetina

LA NEVIDEBLA LEONARDO

Personoj: Maja
La patrino (Vera)
La patro (Branko)
La nevidebla Leonardo
Psikatro (la amiko de la patro)
Davor (junulo)

La unua akto
Sceno unua

La ĉambro de Maja. Maja sidas en fotelo kaj rezignite foliumas ian modgazeton. Radiomuziko laŭtege sonas. La ĉambro en simpatia senordo. La libroj disĵetitaj sur eta tablo funde de la ĉambro kaj la kusenoj dise sur la planko. La kurteno sur la fenestro. En la ĉambron eniras la patrino. Ŝi evidente pretas por eliri.

LA PATRINO: Kaj aranĝu la ĉambron. Jam mi forgesis kiel ĝi aspektas kiam ĝi estas en ordo. *(Nerve butonumas kolperlaron.)* Ne pasigu la tutan vesperon legante aŭ aŭskultante la muzikon. Estu iom utila.
MAJA: *(rezignita kapklinas.)* Jeees.
LA PATRINO: *(Pli severe)* Ĉu vi aŭdis kion mi diris?
MAJA: *(Konfuzite levas la kapon)* Kio?
LA PATRINO: Mi petas.
MAJA: Kion vi petas?
LA PATRINO: Oni diras: mi petas! Ne "kio" sed "mi petas". *(Murmuras ion al si mem sed sufiĉe laŭte ke la filino aŭdu ŝin. Rigardas la horloĝon.)* Nun mi iras. *(Aliras kaj kisas la filinon al la vango.)* Ĝis! Ne kuŝiĝu tro malfrue.
MAJA: *(Plue foliumas la revuon kaj kapklinas je muzikritmo.)*
LA PATRO: *(Eniras kaj aliras la patrinon kiu alligas lian kravaton.)* Ĉio en ordo? *(Li rigardas al Maja.)*
MAJA: *(Daŭre legas kaj kapbalancas.)*
LA PATRO: *(Aliras, malfunkcionigas la radion kaj prenas la gazeton el ŝiaj manoj.)* Mi demandis vin ĉu ĉio estas interkonsentita?
MAJA: *(Rigardas la patron kaj daŭre ŝultrolevas.)* Ĉiukaze nenio estus ŝanĝita!
LA PATRO: *(Mirigita.)* Kio?
MAJA: Nenio, nenio!
LA PATRO: *(Turnas sin al la patrino.)* Kio okazis al ŝi?
LA PATRINO: *(Rezignite svingas la manon.)* Ja estas tia aĝo. Vi devus tion kiel doktoro scii.
LA PATRO: Mi estas kirurgo, sed ne psikiatro. De kie mi sciu kio okazis al ŝi!
LA PATRINO: Ne gravas! Pasos ja tio!

Norma Šerment
(fragmento el la dramo «Nevidebla Leonardo»)
Esperantigis Zlatko Tišljar Pajo

Drama grupo de SEK (Darko Ban, Dubravka Jelčić, Saša Sirovec, Ivan Špoljarec, Krunoslav Tišljar): «La nevidebla Leonardo», Jezolo, Italio, 1978. Fotis Ivan Špoljarec

EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO 2024 KAJ LA 75-a IFEF-KONGRESO EN STRASBURGO

En Strasburgo estis organizitaj de la 8-a ĝis la 12-a de Majo 2024 Eŭropa Esperanto-kongreso 2024, kaj en kadro de ĝi, la 75-a IFEF-kongreso. En preparo de EEK 2024 partoprenis pli ol dek Esperanto-organizoj: UEA, EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), Esperanto-asocioj de Francio, kune kun asocio de Strasbourg, samkiel de **Germanio**, **Belgio**, **Italio** kaj **Svislando**, **TEJO**, **IFEF**, **ILEI** kaj **AIS** (Akademio Internacia de la Sciencoj) kun prelegoj en sesio. La kongresa temo estis „Dialogo inter popoloj, portanto de paco". La kongreson partoprenis 600 aliĝintoj. **Zlatko Hinšt** kiel ĝisnuna ĉefkomitatano, estis en kongreso denove elektita por ĉi-tiu funkcio por la venontaj tri jaroj.

Kadre de la programo de fakaj prelegoj okazis ĉefa prelego de domicila lando de kongreso pri eŭropaj trajnoj kaj fervojaj linioj de grandaj rapidoj en **Francio** de **Hubert Peyrouty** kaj **Christian Dardenne**. Sekvis prelegoj pri aliaj fervojoj. Unu prelego estis dediĉita al granda jubileo de la internacia fervojista Esperanto-movado, ĉar tiama tegmenta organizo Internacia Asocio de Esperantistoj Fervojistaj (IAEF) ricevis sidejon en **Zagrebo** en la tiama **Reĝolando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj/Jugoslavio.** Tiam komencis ankaŭ eldonado de faka revuo en periodo de la jaroj 1924-1930. Redaktoro estis **Ilija Puhalo**, kaj samtempe vicprezidanto de IAEF, kaj ĝia prezidanto **Stevan Stojnić**. Pri tio prelegis d-ro **Zlatko Hinšt** sub titolo „La 100-jariĝo de eldonado de monata fakrevuo 'La Fervojisto' en Zagreb". Estis prezentita ankaŭ broŝuro VERDEN pri projekto pri fervojoj kaj daŭripova disvolviĝo en kiu partoprenis IFEF-anoj. Tiu projekto estis financita de EU.

Zlatko Hinšt, la sekretario de KFEA kaj ĉefdelegito de IFEF, prelegis al Zagrebanoj pri la strasburgaj kongresoj la 21an de majo 2024.

Zlatko Hinšt

PROTEKTO DE NEMATERIA HEREDAĴO: ESPERANTO EN 2024

Ministerio pri kulturo kaj amaskomunikiloj ankaŭ ĉi-jare interesiĝis kion ni esperantistoj faros dum septembro kaj oktobro pri protekto de Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo. Ĝi publikigis la broŝuron en kiu estas kolektitaj la programeroj pri la protektado de la heredaĵo. Kroata Esperanto-Ligo proponis siaflanke, ke la membroj la 13an de septembro promenu al unu el la lokoj de nia heredaĵo: la skulptaĵo La Futuro de **Jesper Neergaard** ĉe la zagreba Kennedy-Placo kiu tie estis starigita en 2001, dum Universala Kongreso de Esperanto. Pri ĝia historio parolis Spomenka Štimec. En la promenado partoprenis dek membroj.

Poste ĉiuj kolektiĝis en la sidejo de la Asocio

Fotis Tomislav Divjak

en Vodnikova 9 kaj aŭskultis la prelegon de **Ankica Jagnjić** pri **Afriko**. **Ankica** tie partoprenis en la unua afrika Universala Kongreso de Esperanto en **Aruŝa** en **Tanzanio**. La prelegon pri Afriko partoprenis 30 membroj.

Per tiu programero estis inaŭgurita la nova sezono en la zagreba Esperanto-Klubo "Tibor Sekelj".

Spomenka Štimec

Prelego de Ankica Jagnjić. Fotis Ivan Špoljarec

BJELOVARAJ ESPERANTISTOJ AL SIA URBO

En Bjelovar en la urba biblioteko "Petar Preradović" okazis la 12a Programo Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo. En la programa fokuso estis la nova kroatlingva poemaro de esperantisto **Zdravko Seleš**, profesoro en la Gimnazio de Đurđevac eldonita ĉe la eldonejo Vošicki en **Koprivnica** *Možda usprkos svemu* (*Eble malgraŭ ĉio*). La libro estas premiita per la premio *Ivan Trnski* 2023. La libron prezentis **Mihaela Cik** kaj la aŭtoro, ŝia profesoro. Post la libroprezento ni konatiĝis kun la projekto *Eŭropaj horizontoj de kresko,* kiun gvidas Dokumenta Esperanto-Centro. En la projekto partoprenis esperantistoj **Grozdana Grubišić- Popović, Roberto Maglica, Mila Bečka, Marija Jerković** kaj **Nataša Dorosulić.**

Post la komuna manĝo en **Miholjanec** ni omaĝis al **Ilija Puhalo** (1899 -1937), esperantisto el **Koprivnički Bregi** ĉe lia memortabulo kaj la kroata ZEO en **Koprivnički Bregi**. Pri li parolis **Zlatko Hinšt** kaj **Josip Pleadin**.

Fotis Ivanka Seleš

LIBRO PRI LA ESPERANTISTO IVAN VEČERINA

La eldonejo Biakova en Zagrebo publikigis en 2024 libron sub la titolo **Večerina** de la aŭtorino **Marinka Šafran Berberović**. La konata profesoro kaj la direktoro de la zagreba klasika gimnazio kaj la patro de la konata kroata advokatino **Dafinka Večerina,** esperantisto de la jaro 1923 vivis de 1906 ĝis 1974. Nun li ricevis malgrandan biografian libron pri sia vivo, el la plumo de la familia amikino. Unu ĉapitro portas la titolon "Profesor **Večerina** kaj Esperanto".

Pri la libro respondecas **Ivan Bekavac Basić.**

S. Š.



USONA ESPERANTSTO EN SPLIT

Usona esperantisto Neal McBurnett kadre de sia somera ŝipkorozado tra Adriatiko vizitis Split la 24-an de aŭgusto 2024. Dum la unutaga restado li renkontiĝis kun Vanda Bralić kaj Ivan Špoljarec kiuj akompanis lin dum la urbovizito kaj poste gastigis lin en sia domo.

I. Š.

KUMEUAUA... la dua eldono en la japana

Plia libro de **Tibor Sekelj** aperis en **Japanio**. Post kiam lia *Kumeuaua*, *la filo de la ĝangalo* estis eldonita en 300.000 ekzempleroj jen aperis la dua eldono kun pliaj 3000 ekzempleroj.

La 57a PIF PREMIO "Tibor Sekelj"

La 57a Pupteatra Internacia Festivalo, kun lanĉis Studenta Esperanto-Klubo, okazis ĉi-jare inter la 13a kaj la 19a de septembro en la organizo de Kultura Centro Travno (eksa Internacia Kultura Servo). En la konkura programo partoprenis 16 teatroj el Ĉeĥio, Francio, Kartvelio, Hispanio, Kroatio, Pollando, Nord-Makedonio, Slovenio kaj Serbio. Okazis ankaŭ abundaj kromprogramoj.

La premion "Tibor Sekelj", por la teatraĵo kun la plej homama mesaĝo, ricevis prezentaĵo *Militkreanto* ("Ratotvorac") plenumita de Pupteatro Dafa el Ĉeĥio. Temas pri la profunde kontraŭmilita rakonto de la miltrifuĝinto kiu migras tra la mondo kaj ĉie kien li alvenas baldaŭ komenciĝas nova milito.

I. Š.



Premio "Tibor Sekelj" estas la skulptaĵo de Iva Mihanović. Fotis Ivan Špoljarec

Sceno el la prezentaĵo "Militkreanto". Fotis Ivan Špoljarec



Tin Ujević

La ĉiutaga lamento

Kiel premas esti febla,
kiel premas esti sola,
kaj esti maljun', sed juna!

Kaj esti febla kaj senpov',
kaj sola kaj sen iu ajn,
kaj maltrankvila, senesper'.

Kaj tretadi tra ŝoseoj,
kaj esti tretata en kot',
Sen stela brilo sur la ĉiel'.

Sen brilo de l' destinostel',
brilanta super la lulil',
kun ĉielarko iluzia.

– Dio, Dio, rememoru,
ĉiujn promesojn brilegajn,
kiujn vi al mi eldiris.

– Dio, Dio, rememoru,
kaj la amon kaj la venkon,
laŭrkronojn kaj donacojn.

Kaj sciu, filo via vagas,
tra la monda valo morna,
trans la dornoj kaj la ŝtonoj,

De nenie ĝis nenien,
kaj sangas piedoj liaj,
kaj koro lia vundita.

Kaj ostoj liaj lacaj estas,
kaj malĝojas animo lia,
neglektita li solecas.

Havas nek fraton nek fratin',
havas nek patron nek patrin',
nek kunulon nek karulin'.

Kaj ver' neniun havas li,
Krom dornoplanton en la kor',
Kaj ardan flamon en la man'.

Kaj vojaĝas li solsola,
sub la fermita ĉielblu',
antaŭ marvasto tenebra.

Kaj al kiu li do plendu?
jen aŭskultas lin neniu,
eĉ fratoj kiuj same vagas.

Ho Dio, ardas via vort',
bridita estas en la gorĝ',
sed sopiras iĝi vekrio.

Fajrego estas la parol',
kaj mi devas ĝin ekkrii,
aŭ mi ekbrulos en ŝtipar'.

Kaj estu mi la arda trunk',
estu mi la flama spiro,
se ne la krio el altec'.

Ho Dio, kiam finos jam,
La vagado ĉi malgaja,
sub la firmamento surda.

Ĉar mi bezonas fortan vort',
ĉar mi bezonas la respond',
kaj la amon aŭ sanktan mort'.

Amara estas absintkrono,
obskura venenkaliko,
somervarmon mi sopiras.

Ĉar pena estas la feblec',
ĉar pena estas la solec',
(se mi povus esti forta,

se mi povus esti kara),
sed pene, la plej penige,
jam esti maljun', kaj tiel juna!

Trad. Damir Mikuličić

Nekrologo

BRANKO REPAC
(1936 - 2023)

La 13an de oktobro 2023 mortis en Zagrebo veterana esperantisto **Branko Repac**. Li naskiĝis en **Kosinj** en **Lika** la 1an de oktobro 1936. Li mem lernis Esperanton de 1983. Li finis Ekonomian lernejon kaj laboris kiel oficisto. Li membris, kune kun sia edzino **Marija Repac** en Esperanto-Societo „Bude Borjan“ . Estante malbonvidantaj ili grave aktivis en KUNE, Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Ili ofte partoprenis en diversaj lokaj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj kaj vojaĝis al Universalaj Kongresoj kaj flegis Esperanton diversmaniere. Ĝi estis grava fonto de lia vivĝojo.

Ili ambaŭ sincere finance subtenis diversajn aspektojn de Esperanto en **Kroatio**, inkluzive ĉe la aĉeto de niaj ejoj en Vodnikova 9.

Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac gardas la nomon **Repac** en la memortabulo inter gravaj donacintoj de la Centro.

Sen **Marija** kaj **Branko Repac** la Esperanto-Movado en **Kroatio** fariĝis multe pli malriĉa.

J. Pleadin



Gustav Krklec

MATENA VENTO

Sur dura voj' mi volis halti, droni,
kuŝiĝi, kun trankvil', en herb' de la tero.
Al nubo, vent', forgesa malapero
ŝarĝon de mia kor' mi volis doni.

Kial sufer' komencis mi rezoni,
ĉu pro standard' riĉaĵoj aŭ karcero,
por iam vidi sunon de l' vespero
al la formik' la formikejon kroni?

Sed nevidebla io min movis skue,
kiel tremol-foliojn ektremeto,
velojn matena vent' post noktkvieto.

Kaj sentis mi: necesas iri plue,
levi la kapon, rigardi plenfide, –
kaj iris mi antaŭen pli decide.

El la kroata: Boĵidar Vanĉik

Gustav Krklec (1899 – 1977) - elstara kroata verkisto kaj tradukisto. La poemon prenitan el *La Suda Stelo* (5-6, marto 1950) ni prezentas okaze de la 125a datreveno de lia naskiĝo.

Sur la vojo de Inkaoj, Bolivio. Foto: Ivan Špoljarec - Štef